

BULTENO



de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk

Fondita 1952

Numero 2

aprilo/majo/junio 1989



33a GEFA-Jarkunveno en Verden/Aller 6a ĝis 8a de oktobro 1989



Das Rathaus in Verden aus dem Jahre 1730

LA RAJDISTA URBO VERDEN ATENDAS VIN

La Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) invitas kore la gemembrojn, familianojn kaj geamikojn al sia 33a jarkunveno. Ni kunvenos la 6an ĝis la 8a de oktobro 1989 en la hejmeca urbo VERDEN (Aller) en Malaltsaksujo.

Ni loĝas kaj kunvenas sub unu tegmento. Ni elektis la tradician hotelon „Niedersachsenhof“, kiu plenumas ĉiujn niajn postulojn rilate al loĝado, komuna manĝado kaj kunvenaj aranĝoj. Detalojn vi trovas en la aldonita aliĝilo.

La rajdista urbo VERDEN (vi povas lasi vian ĉevalon hejme) situas inter Bremen kaj Hannover ĉe la rando de la Lüneburger Erikejo. VERDEN estas centrala renkontejo en Malaltsaksujo. Jam 1000 jarojn tiu loko nomiĝas urbo.

Sed tamen vi ne havos la impreson esti en muzeo, kvankam la historio de la urbo evidentiĝas ĉie. Precipe vi konstatos tion en la miljaraĝa katedralo. Sub ĝia giganta kupra tegmento, kiu leviĝas alten super la episkopa urbo, troviĝas unika klaŭstro kun galerio, imponaj tombejaj monumentoj, baptobasenoj kaj aliaj vidindaĵoj - precipe menciinde estas la „ŝtona viro“, kiun la sakristano volas montri kaj klarigi al vi.

Ankaŭ „Klaus Störtebeker“, la fama marrabisto, postlasis - ĉifoje en bona senco - siajn spurojn. Li donacis sep fenestrojn por la katedralo kaj estis donacinto de fondaĵo: ĉiujare je certa tago la urbestro disdonas panon kaj fiŝojn - ankoraŭ hodiaŭ.

Vi renkontos la historion ĉie en VERDEN,

ne nur en la preĝejoj el la 12/13a jarcentoj, multespecaj kaj belaj domfasadoj sed ankaŭ en la vigla centro. Estas vere agrabla vivo en tiu historia kadro.

En VERDEN ludas ĉevaloj gravan rolon. La mondfamaj aŭkcioj kaj la ĉevalbredado estas konata je ĉiu tiurilate interesito. La trejnado de la saltĉevaloj kaj la rajdturniroj estas rimarkinda vidindaĵo. Ni havos la eblecon rigardi trejnadon je la fino de nia urbrondirado.

Alia kulmino de via restado en VERDEN estos la ekskurso al la birdparko en Walsrode. Tiu belega kaj vasta parko kun neimageble multespecaj birdoj estas unika en la mondo! Panoramoj kaj originaj kondiĉoj ekestas naturan vivsituation por la birdoj el preskaŭ ĉiu angulo de la mondo. Sendube, vi estos ravita pri tiu travivaĵo.

Jen nur kelkaj skizoj pri VERDEN kaj kio atendas vin en tiu pitoreska urbo. Sed super ĉio estas la kunesto kun samideanoj, la renkonto kun amikoj, la subteno de nia alta celo.

Kunhelpu per via ĉeesto kaj kunagu en la klopodo pri Esperanto - kaj permesu al vi en bela loko en societo kun agrablaj homoj feliĉan tempon.

Dieter Hartig

IN DER REITERSTADT VERDEN

treffen sich die Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk (GEFA) vom 6. bis 8. Oktober 1989 zu ihrer 33. Jahresversammlung

Auch Sie, lieber Leser, sind recht herzlich eingeladen, an dieser traditionellen Veranstaltung teilzunehmen. Anmeldeformulare liegen diesem BULTENO bei oder sind bei Ihrem Bezirksbeauftragten für Sie bereitgelegt.

VERDEN ist eine schöne, historisch bemerkenswerte Stadt zwischen Hannover und Bremen am Rande der Lüneburger Heide im Bundesland Niedersachsen. VERDEN hat eine 1000-jährige Geschichte, die überall lebendig ist. Sie werden aber

nirgendwo das Gefühl haben, in einem Museum zu wandeln, obwohl die Vergangenheit auf Schritt und Tritt sichtbar ist; am deutlichsten beim wuchtigen Dom. Unter seinem Kupferdach finden Sie eindrucksvolle Grabdenkmäler, einen imponierenden Kreuzgang, einen alten Taufstein und ein besonderes Geheimnis: den „steinernen Mann“. Der Küster wird davon beim Stadtrundgang berichten.

Auch der berühmte Seeräuber Klaus Störtebeker hat in VERDEN gewirkt - doch im guten Sinne. Geschichte finden Sie vielfältig in dieser bemerkenswerten Stadt: an den Kirchen aus dem 12./13. Jahrhundert, an den alten, wunderschönen Fassaden der Bürgerhäuser. Im munteren VERDEN fühlt man sich wohl, gerade wegen des historischen Rahmens.

Tradition hat VERDEN auch als Reiterstadt. Hier dreht sich das ganze Jahr über vieles ums Pferd. Von den berühmten Auktionen und Pferdezuchten (Hannoveraner) haben Sie bestimmt schon gehört. Reitpferde werden vor den Auktionen ausgebildet - und wir werden Gelegenheit haben, dabei zuzusehen.

Ein ganz besonderer Höhepunkt unserer Jahresversammlung ist ein Ausflug zum Vogelpark WALSRODE, dem schönsten und größten Vogelpark der Welt. Diese Anlage ist wirklich einmalig und wird Sie sicher sehr beeindrucken.

Doch, unsere Jahresversammlung ist eine Arbeitstagung, in der wir das Schöne mit dem Nützlichen verbinden.

30a IFES en Mühlbach/Aŭstrio

De la 26a de januaro ĝis la 4a de februaro 47 fervojistoj kun familianoj partoprenis la ĉi-jaran skisemajnon de IFEF. Ili ekvojaĝis el sep landoj por serĉi neĝon en Aŭstrio kaj trovis ĝin tie, kie la organizintoj de la novjara internacia skisaltado de Bischofshofen kolektis neĝon por preparadi sian skisaltejon: en Mühlbach, fine de proksima, malvasta, multkurbiĝe ascendanta valo. „Nia“ domo Mühlbacherhof (920 m) disponigis optimumajn kondiĉojn por ĉiuj: tutapude la seĝlifto al 1600 m alta skitereno Karbachalm kun

In unseren Zusammenkünften werden organisatorische Fragen behandelt, das alte Jahr resümiert und für das neue geplant.

Sie werden die Gelegenheit zum Ablegen einer Sprachprüfung haben.

Es wird Esperanto gesprochen, denn wir werden wieder etliche Kollegen aus dem Ausland begrüßen können.

Ganz besonders wichtig ist das Wiedersehen mit Freunden und Kollegen. Wir wollen durch unsere Anwesenheit beweisen, daß Esperanto noch aktuell ist bei den Eisenbahnern und auch gesprochen wird.

Das beigefügte Programm informiert über alle Einzelheiten der Jahresversammlung.

Gönnen Sie sich das Erlebnis in einem interessanten Ort mit guten Freunden eine schöne Zeit zu erleben!

Dieter Hartig

Sprachprüfungen

Wir empfehlen die Teilnahme an einer der Prüfungen, die von der GEFA-Prüfungskommission in Verden durchgeführt werden.

Melden Sie sich mit dem beiliegenden Vordruck (aliĝilo) zur Teilnahme an und teilen Sie außerdem Ihre Bereitschaft schriftlich oder fernmündlich mit an:

BAR a.D. Fritz Lautenbach, Abhofach „Esperanto-Gruppe 640 Fulda“, Privatanschrift und Rufnummer: Siehe Bulteno 1/89, Seite 8.

konekso al la najbaraj skiejoj de Dienten, Maria Alm, Hinterthal, Hintermoos; senpaga bustransporto al dua skiejo apud Arthurhaus kun bonaj eblecoj por skimigrantoj kaj komencantoj; abundaj okazoj por sunopromenadoj sen bezinodoraĉo; afablaj kaj helpemaj domgemastroj, komfortaj ĉambroj, bonegaj manĝaĵoj ktp. La eksperimento, ke niaj danaj geamikoj Astrid, Erik, Jan kaj Lene „tele-organizis“ tiun aranĝon, glate sukcesis, jen kuraĝigo por ni germanoj venontjare organizi la 31an IFES'on en la Puster-valo, Italio. Pliajn detalojn pri la 30a vi trovas en IF.

Ritt

Ekstra-trajno al Tornesch

Estis en la jaro 1882.

Generalfeldmarŝalo Helmuth von Moltke ankoraŭ estis Generalo en la ĉefa stabo, dum la milito 1864 li estis en Danlando, poste en 1866 en la tielnomata „Bohemia Milito“, kaj ankaŭ en la germana-franca milito 1870/71 valoris lia komando. Nuntempe oni ne plu povas imagi - sed la grafo Moltke estis ek de 1858 ĝis 1888 la ĉefo de la ĝeneralstabo, tio estis plenaj 30 jaroj! Hodiaŭ ofte defendo-ministro penas feliĉe travivi ununuran elekto-periodon.

Kio tio rilatas al fervojo? Lasu min rakonti! La grafo Moltke havis fratinon. La nobelulino vivis en aristokrata monaĥejo en Uetersen. La maljuna grafo ne hezitis viziti ŝin tie de tempo al tempo. La gefratoj estis tre ligitaj unu al la alia ek de ilia infanaĝo. La nobla sinjoro venis per rapidtrajno, sed en Altona oni forprenis lian salonvagonon kaj kun aparta lokomotivo ĝi daŭrigis kiel ekstra-trajno al Tornesch.

Kiam tia ekstra-trajno per telegrafo estis anoncita, en la stacio Tornesch ĉio renversiĝis. La staciestro jetis sin en apartan uniformon, al kiu aldoniĝis blankaj gantoj kaj longa sabro. La orkestro de la fajrobrigado estis je dispono, kiam la ekstra-trajno kun Moltke atingis la malgrandan stacion. Tiam ili sonegis „Preussens Gloria“. Tio estis kolosa!

Antaŭ la stacio kolektiĝis la homoj kaj ili laŭte kriis: „Vivu grafo Moltke“. En tia momento la malgranda provincstacio kvazaŭ estis grandega ŝtatstacio.

Siatempe vivis en Tornesch la ĉefmasonisto Jan Schröder. Li gajnis dum tiu tempo multe da mono kaj povis foje dancigi la diablon. Iun tagon li ne nur dancigis la diablon, sed ankaŭ la pupojn. Dum tuta nokto daŭris la senzorga amuzado en Hamburgo. Kiam li matene alvenis en la stacio Altona, la trajno al Tornesch ĵus estis ekveturinta. Nun li sidis tie! La plej venonta trajno nur foriris ĉirkaŭ tagmeze. Sed tiom longe li ne povis prokrasti sian laboron. Li anoncis sin ĉe la staciestro de Altona, kaj kiam tiu akceptis

lin, Jan demandis, kion eble kostus ekstra-trajno al Tornesch?

„Kio, dudek markoj?“ Na, tio estis por la ĉefmasonisto neniam temo. Mallonge kaj koncize li diris: „Do, jungul!“ Iom poste tiktakis la telegrafo: „Ekstra-trajno en la plano naŭdektri-kvardekse al Tornesch, alveno sesa kaj kvindekdua horo!“ Kiam la telegrafisto en Tornesch tion notis, li tuj rapidis al la staciestro kaj jam de malproksime vokis: „Moltke venos - Moltke venos“. La staciestro, ĵus sidanta ĉe kafotablo, eksaltis, la kafokruĉo perdis la ekvilibron, la edzino staciestro krias, sed li, la staciestro scias, kio estas lia devo. Li rapidas al la fenestro, malfermas ĝin kaj kriegas eksteren: „Alarmu la fajrobrigadon, rapide alarmu la orkestron!“

Daŭras ankaŭ nelonge kaj la unuaj brigadistoj kune kun la muzikinstrumentoj staras en la stacio - unu en pantofloj, alia eĉ nudpiede. Ili devas stariĝi sin en la duan vicon por ne kaŭzi embarason. Kiel lasta anhelas la dika Hermann Bartels kun la granda tamburo - forte spiregante kaj ŝvitante, sed nun la orkestro estas kompleta. Nur la staciestro ne povas trovi siajn blankajn gantojn. Unu paro estas malpura, la alia refoje ne kuŝas en la plej supra tirkesto. Ĉiam kaj eterne li predikis al sia edzino: Metu ĉion al la destinita loko, alie foriras la tempo per vana serĉado“. Do, se Moltke estas forvojaĝinta, tiam li akre riproĉas al „Madamo“. Tio ja ne povos eterne daŭri! Sed en la momento ekzistas io pli urĝa - la ekstra-trajno alvenas!

La fajrobrigado intonas „Preussens Gloria“ - la staciestro metas la sengantan manon salutante al sia deĵorĉapo, rapidegas al la vagonpordo, malfermas ĝin - kaj forlasas ĝin Jan Schröder, la ĉefmasonisto de Tornesch! Tiu ĉi tuŝetas per du fingroj sian masonistan ĉapon kaj diras pli al si mem: „Tondrobato - kaj ĉion tion por dudek markoj!“ Li afable salutas la orkestron kaj forlasas kapskuante la stacion.

El Sozialblatt 11/12 88 tradukis
Elfriede Kruse

Bremen

La 7an de decembro oni kunvenis por ĉeesti la Zamenhoffeston. Die Jahreshauptversammlung fand am 15. 2. 1989 statt.

Aus den Gruppen

Die **BSW-Esperanto-Gruppe Hamburg** lädt zu den Monatstreffen für das 1. Halbjahr 1989 zu den nachstehenden Terminen jeweils um 10 Uhr ein:
8. April und 10. Juni 1989.

Treffpunkt ist wie bisher vor dem Fahrkartenschalter im Bahnhof Hamburg-Altona. Wir gehen dann zum Tagungsraum, Paul-Neermann-Platz 10 a (Ausgang Ottenser Hauptstraße, gegenüber von Schuhhaus Görts).

Kronach

67a Germana Esperanto-Kongreso,
13. 5. - 15. 5. Informoj kaj aliĝiloj:
Ursula Felhölter, Lathener Straße 4,
4500 Osnabrück.

Seminar „Verkehrspolitik“
der Dt. Esperanto-Jugend, 13. 5. - 15. 5.
Inf.: Deutsche Esperanto-Jugend,
Rheinweg 15, 5300 Bonn 1.

Nekrologo

La 29an de decembro forlasis
nin surprize kaj multe tro frue

BENNO PASSICK (59)

el Hamburgo. Li estis fidela
membro de GEFA multajn jarojn.

Ni profunde bedaŭras lian forpa-
son kaj kondolencas sincere al
liaj familianoj.

GEFA

Tombola in Verden

Im Rahmen unserer 33. Jahresversammlung in Verden findet wieder eine Tombola zu Gunsten der Wörterbucharbeit statt. Wenn Sie einen Gegenstand zur Verfügung stellen möchten, bringen Sie ihn bitte mit oder senden Sie ihn an

Hanna Heimlich, Fröbelstraße 4,
3040 Soltau.

Internationale Universität in China

mit Esperanto

Die Chinesische Akademie der Wissenschaften (Academica Sinica) hat beschlossen, in Peking eine „Internationale Universität für Wissenschaft und Technik“ zu gründen, die als einzige Arbeits- und Studiensprache Esperanto haben soll. Dies teilte der schwedische Mathematikprofessor L. O. Kiselman jetzt nach seiner Rückkehr aus Peking mit, wo er an der „2. Internationalen akademischen Konferenz über Wissenschaft und Technik in Esperanto“ teilgenommen hatte.

Die Universität wird sämtliche Wissenschaftsbereiche umfassen, mit Schwerpunkten auf den Fächern Verwaltung, Wirtschaft und Technologie; als Name ist vorgesehen „Internacia Esperanta Scienc-Teknika Universitato (IESTU)“.

An dieser Konferenz nahmen mehr als 1400 esperanto-kundige Wissenschaftler aus China, einschließlich mehr als 100 aus 22 anderen Ländern teil. Offensichtlich weil diese Entwicklung in der geistig-wissenschaftlichen Elite Europas auf Verwirrung trifft, fügt Prof. Dr. Kiselman (Universität Uppsala, Schweden) erläuternd hinzu, daß Esperanto derzeit in 32 Universitäten und Hochschulen Chinas unterrichtet wird. Er habe viele Studenten kennengelernt, die sich nach 8 Monaten Esperantostudiums sehr nuancenreich hätten ausdrücken können. Diese Erfahrung stünde in krassem Gegensatz zu den großen Schwierigkeiten, die chinesische Studenten mit der englischen Sprache hätten. Ihr rudimentäres Englisch hätte Kiselman kaum verstanden und sie hätten auch sein Englisch nur schwer verstehen können.

Man erwartet daher, daß das Interesse an der neuen Universität groß sein wird und eine strenge Auswahl der Studenten getroffen werden muß. Nur diejenigen werden eine Chance haben, die neben ausreichenden Sprachfertigkeiten auch ausgezeichnete Vorkenntnisse ihres Studienfaches mitbringen. (nach „Esperanto“, 11/88, S. 185)

Esperanto kaj Turismo

Multaj landoj, regionoj, urboj eldonis ĝis nun turismajn broŝurojn/prospektojn en Esperanto, la plimulto kun ilustraĵoj kiuj ne nur sciigas pri turismaj temoj.

Ekde nun estas je dispono novkompilita listo/katalogo pri la ĝisnune konataj eldonoj (mondscale).

Estas rekomendinde, ke Esperanto-societoj/grupoj kaj unuopaj Esperantistoj petu prospektojn en Esperanto por eksterlandaj geamikoj aŭ por vojaĝceloj.

Montru daŭre al oficialaj instancoj kaj turismaj oficejoj la valoron kaj utilecon de Esperanto por internaciaj, eĉ interkontinentaj rilatoj.

Petu informo(j)n aŭ/kaj sendu turisma(j)n propagandilo(j)n al:

Komisiono „ESPERANTO KAJ TURISMO“
c/o C.M.J. Borremans
Niedersachsenweg 9 A
2110 Buchholz 5

Fervojaj novaĵoj

Kunlaboro de la Germana Federacia Fervojo (DB) kaj la poŝto

La Germana Federacia Fervojo (DB) kaj la Poŝto kunlaboris dum 2 jaroj je eksperimenta servigo en la ĉirkaŭaĵo de NÜRNBERG kaj BAMBERG.

Laŭ la favoraj spertoj la Fervojo kaj la Poŝto disvastigis la eksperimentojn al la tuta teritorio de la lando.

La kunlaboro signifas, ke la servigojn oni aplikas sur ĉiu tereno, kie necesas, kaj eblas. Ekzemple: pecvarojn, kiuj estas maksimume 20 kg-aj, la poŝto transprenas kaj surbaze de la komiso de la Fervojo la Poŝto liveras al la adresato.

Se la sendaĵo superas la 20 kg-ojn, la varon la fervojo akceptas kaj transportas al la adresato.

La elektrizado de la Luksemburgaj Fervojoj

Laŭ la decido de la Luksemburgaj Fervojo, kiel eble plej rapide oni devas elektrizi la tutan retaron.

Sur la elektrizita reto la fervojo kapablas altiĝi la pasaĝer- kaj vartrafikon per trajnokoneksoj taŭgantaj al la pretendoj.

La longo de la ĝis nun elektrizitaj linioj estas 162 km-oj. El ĝi 143 km-ojn longan linion oni funkciigas per 25 kV-a alternkurento, kaj 19 km-ojn longan linion per 3 kV-a kontinua kurento.

Laŭ la planoj la tuta reto estos elektrizita en 2 etapoj ĝis la jaro 1993.

“Hungara fervojista mondo“

Grésillon (okcidenta Francio)

En tiu Esperanta kastelo (!) apud Angers oni aranĝos multajn kursojn kaj renkontigojn:

16. 6. - 30. 6.

Internacia amika renkonto

2. 7. - 17. 7.

Prelegoj k.a. okaze de la 200-jara datreveno de la Franca Revolucio.

18. 7. - 31. 7.

Kursoj diversnivelaĵ

1. 8. - 14. 8.

Prelegoj k.a. pri Edmond Privat.

14. 8. - 28. 8.

Kursoj diversnivelaĵ.

Tagaj prezoj: diversaj - de 113 FF por tendumantoj kiuj restas pli ol unu semajnon, ĝis 190 por unupersona ĉambro.

Jen la adreso por peti pliajn informojn pri ANGERS kaj pri ANJOU ĝenerale:
-S-ro André FRANGEUL, 6 rue du Buis,
La Roseraie, F-49 000 ANGERS.

Redaktfino por n-ro 3/89 estas la 10.6.1989